
N-ro 3/2008
20a jaro (2a periodo)



# inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktis kaj enpaĝigis Judith P. Abrahamsen


**Karaj amikoj!**
La somero frapas la pordon. Ĉu vi iros al esperanta aranĝo ĉi-somere?

Inter la plej proksimaj kaj partoprenindaj aranĝoj verŝajne estas la KEF en Helsingør, Danio: www.kef.saluton.dk

En tiu numero vi interalie povas legi la raporto pri la kabana semajnfino kiun aranĝis NJE en aprilo.

Bonan someron!

*judith*



## Ne snaku tro hope

Ĉu vi ne komprenis la titolon de tiu ĉi artikolo? Tiam vi verŝajne ne partoprenis la kabanan semajnfinon de NJE. Ĝi okazis dum la unua semajnfino de aprilo en la arbaro de Tveitåsen en Våler en Østfold, kaj partoprenis ĝin ok homoj kaj unu hundo, kiuj ĉiuj ĝuis diversajn ludojn kaj aktivaĵojn, inter aliaj:

– ĉina ŝako
– akvoportado
– bakio
– manĝado
– ĉina ŝako
– enigmoludoj
– bivakfajroj
– kuirado ekstere
– akvoportado
– ĉina ŝako kun frenezaj kromreguloj
– lignohakado
– akvoportado
– ĉu mi menciis ĉinan ŝakon?



*Espen Stranger-Johannessen kaj Magnus Henoch. Fotis: Einar Faanes*





*Maldekstre: Finjo van der Veen kaj Heming W. Thorbjørnsen. Supre: Raymond Johansen gardas la fajron. Fotis: Einar Faanes.*

Ni ĉiuj tre dankas al Raymond, kiu malplenigis la necesejsitelon; Finjo, kiu instruis Esperanton; Magnus, kiu instruis bakion; Ksenia, kiu gvidis enigmoludojn en la arbaro; Martin, kiu konstruis kuirfajrojn; Einar, kiu ne mortis malgraŭ alergio kontraŭ io; Espen, sen kiu neniu manĝus ĉokoladon per forko kaj tranĉilo; kaj Chika, kiu forpelis la sciurojn. Sen ni ni ne tiom amuziĝus!

Mi ne scias, ĉu eblas doni al nepartoprenınto la ĝustan senton pri la etoso kaj amuziĝo kiujn ni spertis. Eble mi simple diru jene: Venontfoje ankaŭ vi venu. Tiam vi scios.

Ho, ĉu vi kredis, ke mi klarigos al vi la superskribon, kaj legis ĝis la fino nur pro tio? Bedaŭrinde, vi malpravis. Mi ne klarigos. Mi nur diras, ke neologismoj ĉiam devenas de iu nacia lingvo, kaj ke multe povas okazi dum la ludado de ĉina ŝako…

*Heming*

## Venonta IND

La venonta *Inter ni dirite* havas limdaton la 22an de aŭgusto 2008. Sendu vian kontribuaĵon al: nje@esperanto.no

© Øverli. distr. strandoverli@yahoo.com

n-ro 10



# La jarraporto de NJE 2007

Tiu raporto estas nur eltiraĵo. Vi povas legi la tutan raporton ĉe la retpaĝoj de *Inter ni dirite*: http://www.esperanto.no/nje/ind/

### Administrado

Dum la landa kongreso, elektiĝis nova estraro. Dum la unua duono de 2007 (kaj ekde la landa kongreso en 2005) sidis la jena estraro:

- Signe Christophersen, prezidanto
- Kristoffer R. Haug, vicprezidanto (forpermeso ekde oktobro 2006)
- Kai Salvesen, sekratario
- Leif Arne Storset, kasisto
- Aleksander Helgaker, estrarano
- Judith Parelie Abrahamsen, anstataŭanto

La estraro post la landa kongreso estis:

- Judith Parelie Abrahamsen, prezidanto
- Matias Jentoft, vicprezidanto
- Einar Faanes, sekretario
- Leif Arne Storset, kasisto
- Kenneth Sortland Myklebust, estrarano
- Oda Aase Johnsen, anstataŭanto

Oda Aase Johnsen petis kaj ricevis forpermeson ekde estrara kunveno la 15an de oktobro.

Okazis tri estrarkunvenoj en 2007 – ĉiuj estis telefonaj. Granda parto de la estrara laboro okazis retpoŝte.

La 31an de decembro 2007 NJE havis 28 membrojn (2006: 29).

### Financoj

La jarkalkulo montris *malprofiton* de NOK 1 086. (La kaŭzo de la malprofito estas ke la subvencio de NEL venis dufoje en 2006 kaj ne en 2007.) NJE posedas NOK 26 336 en norvega bankkonto kaj EUR 70 en UEA-konto njea-u.

### Jen nia mondo

NJE planas eldoni norvegan version de *Jen Nia Mondo*, kurso pri esperanto konsistanta el du libroj kaj KD (ni tradukos provizore nur la librojn). La laboro iomete stagnis pro manko de laborkapacito.

### Sakraĵ-konkurso

NJE lanĉis sakraĵ-konkurson en decembro 2006. Ĝi ricevis sufiĉe grandan atenton en la esperanto-medio, kaj venis kelkaj kontribuaĵoj jam antaŭ la jarŝanĝo. Dum la landa kongreso la gajnintaj sakraĵoj publikiĝis. Sendube, laŭ la intereso de kontribuantoj kaj aliaj, ĝi estis sukceso.

### Konkludo

2007 estis pozitiva jaro por NJE. Novaj membroj daŭre alfluis. Sed pro tio ke la estraranoj multege okupiĝis pri laboro kaj aliaj projektoj, la aktiveco ne estis je la dezirata nivelo. NJE-listo bedaŭrinde ne tre aktivis por diskutoj, sed bone utiligis kiel informkanalo. *Inter ni dirite* funkciis bone kiel la organizaĵa membrogazeto kaj enhavis interesajn artikolojn. La sakraĵkonkurso iĝis granda sukceso kaj vidigis NJE al la tuta esperantomondo.

— Fino de *Inter ni dirite* —